Maĉupikĉuo

Maĉupikĉuo (keĉulingve *Machu Pikchu*, hispanlingve *Machu Picchu*) estas la plej grava arkeologia loko, kiu en Peruo restis post la inkaa imperio.

La sankta urbo Maĉupikĉuo, kies nomo signifas "malnova pinto" en la keĉua lingvo, kaj kiun Hiram Bingham alnomis "La perdita urbo de la inkaoj", estas antaŭkolumba arkeologia ejo situanta je 130 kilometroj nordokcidente de la urbo Kusko en Peruo. Konstruita sur la samnoma montosupro, tiu urbo kuŝas je pli ol 2700-metra alteco.

La situo de tiu urbo estis rigardata kiel militista sekreto, sed precipe la profundaj ravinoj kaj la krutaj rokoj estis ĝia plej bona defendo. Ŝajnas aliloke, ke spiritaj konsideroj kompletigis la strategian intereson de tiu lokelekto.

Hodiaŭ oni supozas, ke la urbo estis konstruita dum la regado de la imperiestro *Pachakutiq*, kiu imperiestriĝis en 1440. La urbo estis loĝata ĝis la Hispana invado en 1532.

Laŭ la arkeologiaj esploroj efektivigitaj surloke, Maĉupikĉuo ne estis tradicia urbo, sed pli vere fortikaĵo utiligata kiel dua palaco de la imperiestro kaj lia kortego. Oni taksas, ke la loko havis ne pli ol 750 loĝantojn sume.

Iuj nuntempaj teorioj asertas ke tiu loko estis inkaa *llaqta*, tio estas fortikaĵo dediĉita al la ekonomia regado de la okupitaj zonoj. Per siaj arkitekturaj riĉaĵoj Maĉupikĉuo estas unu el la plej gravaj arkeologikaj lokoj.

Laŭ arkeologoj, Maĉupikĉuo estas dividita en tri grandajn sektorojn: la sankta kvartalo, la popola kvartalo kaj la nobela kvartalo ankaŭ ekleziula. La sankta zono estas dediĉita al *Inti*, la Suno-Dio, precipa diaĵo de la inkaa panteono. Tie troviĝas la arkeologikaj trezoroj, el kiuj la plej gravaj estas la suna horloĝo (*Intihuatana*) kaj la Suntemplo.

La ruinojn malkovris la universitata esploristo Hiram Bingham en 1911, kiu poste kun apogo de National Geographic Society reveturis kun du ekpedicioj en 1912 kaj 1915. Li ĉiufoje hejmenveturis kun kestoj plenaj je arkeologiaĵoj. Tion permesis la tiama ŝtatprezidanto de Peruo, Augusto B. Leguia. Peruo provas reakiri tiujn elfosaĵojn jam de 1917. La Yale-universitato redonis kelkajn negravajn trovitaĵojn.

La peruan registaron ekscitis, kiam la Peabody-muzeo en 2003 faris migrantan ekpozicion kun la elfosaĵoj en Usono, kiun vizitis pli ol 1 miliono da homoj.

Ĉiuj konstruaĵoj en Maĉupikĉuo estas en klasika inkaa stilo. La muroj estas komponitaj el ŝtonoj perfekte alĝustigitaj. La inkaoj ne utiligis cementon. La granito de la konstruaĵoj devenis el la malproksimaj ŝtonminejoj. La tekniko estis tre evoluigita por suprenirigi ĝis la kulmino de la monto ŝtonblokojn, kiuj povis pezi plurajn tunojn.

Ekde 1981 Maĉupikĉuo estas klasita kiel naturrezervejo por protekti la kreskaĵaron kaj la bestaron. En 1983 Unesko deklaris la ejon kiel parton el la mondheredaĵo.

Retpaĝo: www.traduki.de
Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Machu_Picchu